# EKO

Esperiga Komuniko

Subtene al la loka, landa, faka kaj regiona agado

**Enhavo**

- La nova plurpolusa mondo
- Informoj de ILEI, TEJO, UMEA, MONA
- Sukcesa virtuala kongreso de ILEI
- Brila filmeto de TEJO pri Duolingo
- La 17 celoj de UN – nova libro survoja

Redakcio: Stefan MacGill, Mirejo Grosjean.

*EKO 2020-41 sendita el Budapeŝto, la 6an de aŭgusto.*

*Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en multaj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Pli ol dumil kun plusendoj.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

# Sukcesa VEKIĝo de ILEI

Kun 350 partoprenantoj ni povas paroli pri sukceso, sciante, ke niaj Kongresoj kutime arigas inter 70 kaj 170 personojn. Kun 75 programeroj, ĉiuj malsamaj krom du horoj, spekteblaj en ĉiuj horzonoj sen distingo, ni povas paroli pri bunta programo diversnivela, de babilado al serioza debato kaj al universitataj prelegoj. Dek koncertoj plezurigis la partoprenantojn. Kun efika prizorgado de la platformo fare de la slovaka firmao E@I sen unu sola paneo, ĉio iris glate kaj pli ol kontentige.
Enhave la konferenco estis fruktodona. Diversaj pedagogiaj spertoj aperis, kontakto inter universitatoj funkcias kaj kuras, novaj ideoj naskiĝis kaj jam estas en fazo de konkretiĝo. Multaj homoj povis revidi geamikojn, saluti fratece kaj babili libere. Brakumoj kaj kisoj vidiĝis surekrane. Do ni povis retrovi konatan kongresan etoson amikan.
Aldoniĝis vidbabilejoj, kun aŭ sen preciza temo, kie la ideoj furoris kaj brilis en libera etoso. ILEI volas rekrei tian eblon en 2021, kun la espero, ke alveno al Edinburgo eblos por kelkaj vojaĝemaj esperantistoj sen virusaj bremsoj. Do ni nun planas **hibridan kongreson** por ebligi la partoprenon de foraj personoj kaj obstaklataj homoj. Ni bezonos por fari tion du kompetentajn personojn, kiuj kapablos filmi kaj sendi niajn diskutojn kaj prelegojn al la mondo kaj zorgi pri debatebloj tutmondaj. La Estraro de ILEI jam decidis pri senpaga restado por tiuj du teknikaj spertuloj. Ĉar ni diskonigas tiun alvokon en aŭgusto, iu neesperantisto povas kandidatiĝi nun kaj havas 10 monatojn por lerni Esperanton. Ĝis Skotlando la dekan de julio 2021! Ni retrovu nin per la Reto jam nun tuj kaj regule tra la jaro!

Mireille Grosjean, Prezidanto de ILEI

## Gvidlibro pri la 17 celoj de daŭripova evoluigo de UN

Mi ŝatus atentigi vin pri gvidlibro al la 17 celoj por daŭripova evoluigo de la UN. Ĝi aperos libroforme, sed la unuopaj ĉapitroj jam nun estas legeblaj en la interreto: http://www.esperantoporun.org/gvidilo-al-la-17-celoj-por-dauripova-evoluigo-de-unuigintaj-nacioj. Mi mem verkis ĉapitron pri celo 3, „Bona sano kaj bonfarto", kiel reprezentanto de la UMEA.

Christoph Klawe, prezidanto de UMEA

## TEJO sekvas la progreson de Duolingo

Tre ofte en Esperantujo oni demandas kie estas tiuj homoj kiuj lernis Esperanton per Duolingo. Por respondi al tiu demando, nia junulara sekcio, TEJO, publikigis novan filmeton pri la Duolingo-generacio.

**Duolingo-lernintoj estas ankaŭ inter ni.**

En UEA du komitatanoj estas Duolingo-lernintoj, en TEJO temas pri eĉ pli granda kvanto, kaj du el ili oficos ekde septembro en la estraro de TEJO kiel prezidanto kaj vicprezidanto.
Mi varme invitas vin spekti kaj poste diskonigi la filmeton.

Marko Konijnenberg, TEJO




Jen afiŝo per kiu TEJO mendis la filmopecetojn el la multaj roluloj kiuj aperis en la filmo.

**Pritakso SMG:** La filmeto estas bone pretigita kaj enplektis amason da diverskontinentaj partoprenantoj. Ĝi certe figuras inter la plej allogaj varbaj filmetoj faritaj entute. Unue, ĝi helpas konvinki pli longtempajn esperantistojn pri la valoro de la revolucia projekto. Due, ĝi povos forte influi novajn potencialajn kursanojn. Tiucele, TEJO faris alvekon por akiri anglalingvajn (aŭ alilingvajn) subtitolojn. Tio estos forta konvinkilo al la teamo de Duolingo, ke la kurso por Esperanto estas populara, kaj helpas al ili atingi mirinde multlandan publikon. Iru, rigardu ĝin!

# Nova kurso por arablingvanoj

Ĉiuj povas rigardi la jam faritajn lecionojn ĉe https://www.espero.ir/eo/esperanto-kurso-araba/

Interesiĝantoj bonvolu kontakti kursaro.sekelj@gmail.com




============ vortoj: 520 =============

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis 2020/33. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.